‚Mutig vorwärts!' **Aŭstria** ‚Kuraĝe antaŭen'

Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

11a jaro. N-ro 2 **Monata** **Februaro 1934**

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ Ŝ 3.90, germanlandanoj RM 2.75 alilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Al la Savintoj de Aŭstrio!

Vi savis nian belan patrolandon Aŭstrio dum la lastaj tagoj el neimagebla danĝero!

Per helpo de Via energio. aktiveco, antaŭvido, antaŭzorgo kaj malhezitemo, fidante je nia brava kaj kuraĝega policistaro, ĝendarmaro, soldataro kaj la ŝirmkorpusoj (Heimwehr, Sturmscharen, Freiheitsbund, Christliche Turner ktp.), Vi — dank al Dio — sukcesis venki la danĝeron.

Ni dankas Vin el tuta koro kaj estas certaj, ke vi nun gvidos nian hejmlandon Aŭstrio al pli bona estonteco!

La nomoj

Kanceliero Dro Engelbert Dollfuss
Vicekanceliero majoro Emil Fey
Princo Ernst Rüdiger Starhemberg (komandanto de Heimwehr)
Ministro Dro Kurt von Schuschnigg (komandanto de Sturmscharen)
Ministro Fritz Stockinger (kommandanto de Freiheitsbund)
Ekskanceliero, generalo de infanterio Karl Vaugoin (prezidanto de la fervojaro)

kaj de multaj aliaj restos eternigataj en la historio de Aŭstrio.

Por la Aŭstria Esperantistaro: Steiner, prezidanto.

Aus aller Welt.

Bundesminister für Unterricht **Dr. Kurt von Schuschnigg** über Esperanto: „Esperanto kann für unsere Jugend ein beachtliches Lehrmittel sein, das mithilft, die notwendigen Brücken zur Völkerversöhnung und -Verständigung zu bauen."

Wien, 19. Jänner 1934.

Neue Zamenhofstrasse. Der Stadtrat von Innsbruck hat den Beschluss gefasst, eine Strasse nach dem Erdenker des Esperanto „Dr. Zamenhof-Strasse" zu benennen. Wir danken Herrn Bürgermeister Fischer!

Die **Internationale Kriminalkommission**, welche Ende **September** in Wien tagte, beschloss die Frage über den Gebrauch der internationalen Sprache auf die Tagesordnung der im April in Wien stattfindenden Tagung zu bringen.

Radiojournal Brünn mit den Sendern von Prag, Pressburg, Mähr. Ostrau und Kaschau veranstaltet am 21. Februar von 22 h 30 bis 23 h 10 das 8. Unterhaltungsstündchen in Esperanto; das 9. findet anläßlich des Geburtstages des Präsidenten der Tschechoslowakischen Republik Thomas Garigus Masaryk unter der Devise „Die Wahrheit siegt" mit reichem künstlerischen Programm statt. Außerdem jeden Samstag von 17 h 15 bis 17 h 25 von Brünn Esperanto-Sendung. Zuhörer berichten guten Empfang an Radiojournal, Brno.

Die internationale Messeunion, die in Valencia (Oktober 1933) tagte, hat mit 19 gegen 4 Stimmen einen Antrag der Messe Valencia angenommen, in dem die Fortführung der Aufnahme des Esperanto als Verkehrssprache der Messeämter gewünscht und weiter durchgeführt werden soll.

Die **Pariser Messe** versendet in Esperanto Einladungsbriefe, in denen mitgeteilt wird, dass die Messe festgestellt habe, dass viele

ihrer Besucher und Aussteller aus Frankreich und dem Auslande zur Abwicklung ihrer Geschäfte Esperanto benützen. Die Messe erhofft zahlreiche Beteiligung seitens der Esperantisten des Auslandes und teilt mit, dass sie für die Mitarbeit der Esperantisten sehr dankbar ist. Gleichzeitig übersendet die Messe einen schönen, vornehm ausgeführten Prospekt der Messe (8 Seiten), Besucherkarten und Verschluss-Reklamemarken, alles in Esperanto Anfragen an Foire de Paris, Paris, 23. Rue N. D. des Victoires.

Die **Wiener Messe** hat an den Esperanto-Auslandsdienst ein Schreiben gerichtet: „Sie hatten die Freundlichkeit, gestern abend im Wiener Rundfunk einen außerordentlich gut gelungenen und bemerkenswerten Vortrag über die Wiener Frühjahrsmesse zu halten, der, wie wir uns vergewissern konnten, in weiten Kreisen lebhafte Beachtung gefunden hat.

Wir ergreifen gerne die Gelegenheit, Ihnen für diesen Beweis Ihres freundlichen Interesses für die Wiener Messe unseren aufrichtigsten Dank auszudrücken".

Der **1. Esperanto-Landeskongress** in **Palästina** fand am 20. I. in Jerusalem statt.

„Revista da Sociedad de Geografia" in Rio de Janeiro, die bedeutendste wissenschaftliche Zeitung Brasiliens, mehr als 100 Seiten stark, bringt nach jedem Artikel in portugiesischer Sprache einen Auszug in Esp.

Esperanto Auslandsdienst:

21. Februar: **Reg. Rat Steiner** »Offizieller Bericht über die Vorfälle der letzten Woche.« (Bericht des Bundespressedienstes)
28. Februar: **Hofrat Dr. Franz Wollmann**, Landesschulinsp. a. D., Direktor der Staatsprüfungskommission für Esperanto »Die Internationale Konferenz-Wien 1934 und die Schule«.
7. März: **Gustav Weber** »Kunstgewerbe in Österreich«.
14. März: **Reg. Rat Steiner** »Schloß Schönbrunn«.
21. März: **E. G. Bernfeld**, Hauptvertreter des Esperanto-Weltbundes-Genf für Österreich »Frühlingserwachen in Kärnten«.

Internacia Konferenco.

„Esperanto en la lernejon kaj la praktikon."
19.—24. de majo 1934.

Adreso: Internacia Konferenco, Wien, Neue Burg.

Kotizo: Svis. fr. 12.— aŭ aŭst. ŝ. 20.—, por kio vi ricevos rabaton sur niaj fervojoj, enirbiletojn por Solena Malfermo en la Parlamentejo, al la festprezentado en Staatsoper (La Vesperto), por vizito de la ĉambraro en la imperiestra kastelo, por la vesperarangoj ktp.

Poŝtŝparkasa konto aŭstria: B 190.946.

Telegramadreso: Esperantokonferenco Wien.

Vizo: Senpaga por ĉiuj konferencanoj, escepte por anoj de USSR kaj senŝtatanoj. Valida pasporto sufiĉas.

Al la **Germana Registaro** ni faris pere de la Germana Ambasadorejo en Wien petskribon, por ke la registaro permesu la partoprenon en la Konferenco sen pago de 1000 M-imposto.

Samtempe ni faris petskribon al la **Pola Registaro** ankaŭ pere de la Pola Ambasadorejo en Vieno, por ke la Registaro malaltigu la imposton por vojaĝo eksterlanden por la konferencanoj.

Malferma Solenaĵo okazos en la Parlamentejo, kiun nia Kanceliero disponigis al la Konferenco; ĝis nun la Parlamentejo nur entute dufoje estis disponigita por solenaĵoj.

„Katholischer Schulverein", t. e. „Unio por la katolika lernejo" de Aŭstrio aranĝos kun helpo de Katolika Unio Esp. en Wien la 20. de majo Diservon kun E-prediko kaj kantoj, antaŭ la solena malfermo de la Konferenco. Certe partoprenos en la Diservo niaj aŭstriaj eminentuloj. La ĝeneraldirektoro de Kat. Schulverein d-ro Brunauer nun lernas E.-on kaj faros prelegon pri „Esp. kaj la katolika lernejo".

Certe interesos vin, ke gravaj ŝip-kompanioj kiel **Cunard Line, Red Star Line, White Star Line kaj Norddeutscher Lloyd** deziras fari propagandon por la Konferenco!

Multaj invitleteroj en dek lingvoj jam foriris en la mondon. Sendu al ni adresojn de invitotaj instancoj kaj gravaj personoj. Sed ankaŭ mem instigu ĉiujn laŭ la temo de la Konferenco interesigotajn instancojn, korporaciojn, firmojn, eminentulojn ktp. al aliĝo en la Konferenco kaj al delego de reprezentantoj, kiuj estu plej bone esperantistoj! Se ili ne sendos delegitojn, ili certe aliĝu kaj sendu krome konsentleterojn. Tiam ni povos ilin noti en la eidonota Konferenclibro!

Alvenis jam aro da **aliĝoj** el Aŭstrio kaj el diversaj landoj.

Parolontoj pri diversaj temoj jam anoncis sin. Tiajn sinanoncojn kun aldono de la manuskripto pri la farota prelego oni sendu al ni en la gepatra lingvo de la parolonto kun E.-traduko.

Grave: La unuaj aliĝintoj ricevos la pli bonajn sidlokojn en la operejo por la festprezentado!

Ne hezitu, sed laboru kaj tuj anoncu vin! La tempo urĝas!

Esp.-gazetoj represu tiujn notojn!

Int. Esperanto Muzeo en Wien

Wien, I. Neue Burg, Heldenplatz.
Telefono n-ro R 27-803

Malfermata labortage 9—12, 15—18 h; sabate 9—12 h.

Dumvivaj membroj (Aŭstrio S 15.—; alilandaro egalvaloro de svis. fr. 12.50; event. en 3 partpagoj):

538. Georgo K. Marangelis, Plomari-Mitilino, Grekujo; 539. Paulo Doubek, Villa Calzada, Argentinio; 540. E. Balesch, Buenos Aires, Argentinien.

Nova Zamenhofstrato. La urbkonsilantaro de **Innsbruck**, ĉefurbo de Tirolio, decidis la 25. de oktobro, nomi straton „Dr. Zamenhofstrasse“. Koran gratulon kaj dankon al la urbestro, s-ro Fischer.

Adreso: Fredsgatan 4.

Kotizoj: 20 sved. Kr. ĝis 31. marto, 25 ĝis 1. julio kaj 30 poste.

Loĝejprezoj: Favoraj kondiĉoj je mendo por 7 tag-noktoj. La prezoj enhavas ĉiujn trinkmonojn, sed sen iu manĝo:

a) Lukshotelo: 70 sved. Kr.
b) granda hotelo kun aparta ban — aŭ duŝ-ĉambro kun fluanta akvo (unulita 49·—, dulita 91)
c) malgranda hotelo, kun fluanta akvo en ĉiu ĉambro (42·— resp. 84 Kr.)
d) malgranda hotelo sen fluanta akvo (35, 70, 84/3 pers./, 112/4 p./,
e) „Hejmo por virinoj“, kvarlitaj ĉambroj; po persono 17·50
f) loĝo en diversaj ŝtataj aŭ privataj societoj; 4—6 litaj ĉambroj; po persono 17·50
g) en kazerno; po persono 11·30
h) en privataj familioj; 21.

Frua mendo rekomendinda. Matenmanĝo ne enkalkulata. Ĝi kostas en hoteloj 1—1·25 Kr.; sed sufiĉas ĝis la tria horo posttagmeze.

Allogajn postkongresajn vojaĝojn aranĝos Esperanta Turista Komisiono. La Universala Kongreso finiĝos 11 aŭg.

Jen la ekskursaj eblecoj:

A. 11—18. aŭg. al Laponio (Kiruna, Abisko, Purjus, Narvik), 1500-kilometra vojaĝo norden de Stockholmo, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono, prezo proks. 150 sved. kr. Limigita nombro.

B. 11—15 aŭg. al Jemtland (Are, Trondheim), 900-km nordokcidenten de Stockholmo, vojaĝo, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono. Prezo proks. 80 sved. kr.

C. 11—15 aŭg. al la insulo Gotland (Visby), vojaĝoj, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono, en la plej malkara klaso 35 sved. kr.

Antaŭkongresoj.
a. Malmö (Svedujo).
b. Gotenburgo (Svedujo).
c. Oslo (Norvegujo).

Postkongresoj.
a. Tallinn (Estonio).
b. Helsinki (Finlando).

Ĉiu kongresano ricevos informojn kaj aliĝilojn al la koncernaj kongresoj.

Loka Kongresa Komitato.

Postkongreso en Tallinn, la belega ĉefurbo de Estonio, 12.—14. aŭg. Informojn de E.-Asocio de Estonio, Postkast 6, Tallinn.

Ĝi vi jam estis en Norvegujo?

Se ne, rapidu al Antaŭkongreso!
Se jes, vi ne bezonos instigon!

Antaŭkongreso en Oslo, la ĉefurbo de Norvegujo, okazos 2.-3. aŭg. Ĉiujn informojn donas kaj belegan gvidlibron sendos al vi Norvega E.-Asocio, prez. kapit. Bugge-Paulsen, Oslo, Schivergt. 41.

La nova ejo de Cseh-Instituto.

Internacia Cseh-Instituto ĝis nun estis gasto ĉe ges-roj Isbrücker. Pro la ampleksiĝo de la laboroj ĝi bezonis pli grandan hejmon kaj transloĝiĝis al Haag, Riouwstrato 172. La oficiala inaŭguro okazis la 12. de dec., en kiu ĉeestis s-ro Marchant, reprezentanto de Nederlanda ministro por instruaferoj, prof. C. J. van der Bilt. skabeno de instruado en Haag, inĝ. M. H. Damme, ĝen. dir. de la nederl. P. T. T. kaj aliaj.

En la sama domo estas redaktejo de „Praktiko”.

Ni kore gratulas!

Naturscienca kunsido okazis dum XXI-a Kongreso de Esp. en Kioto, 1933. Prezidis Kuwahara-Tosihide de Ŝtata Industria Laboratorio de Oosaka kaj sekretariis Niwa-Susuma de Fizika Instituto de Imperia Universitato de Kioto. Ĉeestis scienculoj el diversaj branĉoj. (ISAE)

Esp.-ekspozicio en la Levanta Foiro en Tel-Aviv, Palestino. (26. IV.—26. V.)

En la kadro de la Foiro E.-grupo „Paco kaj Frateco” en Jerusalem deziras aranĝi E.-ekspozicion. Del. inĝ. P. Lanovicki, Kerem, Jerusalem, petas je alsendo de esperantaĵoj kaj propagandiloj.

Esperantista Lingva Komitato

Akademio.

Sekretariejo: R. de Lajarte, 4, Villa d'Orléans, Fontonay-sous-Bois, Seine (Francujo).

La Akademio jus alprenis metodojn por plisimpligi kaj plifaciligi funkciadon de la Lingvaj instruciloj; il estos aplikataj dum la jaro 1934, kaj, se ili sukcesos, dum la sekvantaj jaroj.

1. **La unuaj rilatas la preparadon de la elektoj de la Lingva Komitatanoj.**

a) **Dum la tuta jaro, je kiu ajn dato,** sed ne pli malfrue ol la 1. decembro, rajtos prezenti kandidaton, ne nur, kiel ĝis nun, la propagandaj, aplikaj kaj specialaj esperantaj societoj aŭ grupoj, la anoj de la Lingva Komitato kaj de aliaj altaj oficialaj institucioj, sed ankaŭ kiu ajn Esperantisto, kiu plie povas prezenti sin mem.

b) **Tiuj ĉi proponoj devas esti sendataj al la Nacia Asocio de propagando de la lando de l' kandidato,** kune kun deklaro subskribita de li (ekzemplero de tiu ĉi deklaro estos ricevita laŭ peto adresita al la sekretariejo de la L. K.-o).

c) **La Naciaj asocioj transdonos la ricevitajn proponojn kaj deklarojn al la Akademio,** kune kun sia opinio pri ĉiu el ili

ĉ) **La L. K.-anoj, kiuj deziras eksiĝi,** sciigos pri tio sian nacian asocion, samtempe kiel la prezidanton de la Lingva Komitato.

d) **La Universala Esperanto-Asocio, (Sekcio de Eksteraj Aferoj), ludos la rolon de nacia asocio** por la landoj, en kiuj ne estas tia asocio.

2. **La aliaj metodoj rilatas la prilingvan funkciadon.**

a) **Dum la tuta jaro, je kiu ajn dato,** ĉiu Esperantisto rajtas proponi al la Akademio oficialigon de vortradiko. Tiu ĉi propono devas esti sendata al la Prezidanto, kune kun detalaj sciigoj difinotaj sur tabelo, kies ekzemplero estos ricevebla laŭ peto al la Sekretariejo de la Lingva Komitato.

b) La Akademio starigis Sekcion de Kontrolo, kies tasko estas kontroli evolucion de la lingvo. Ĉiu Esperantisto povas kaj devas helpi tiun ĉi Sekcion plenumi ĝian taskon. Detalaj sciigoj estos kiel eble plej diskonigitaj per la gazetaro; kaj plie estos ricevebla laŭ peto al la Sekretariejo de la Lingva Komitato.

La prezidanto: M. Rollet de l'Isle.

Ŝangoj en la Jarlibro de L. K.

Forigu:

Degon, Grosjean-Maupin, Jodko, Obručev, Reed (Edw. C.), Rohrbach, Underdill.

Aldonu:

Dalmaŭ (Delfi), 245 str. València, Barcelono; Deligny (Ernest), 4 rue Allent, St. Omer, Pas-de-Calais; T. Jung, Brüsselerstraße 94, Köln a. Rh.; Kawasaki, 409 Hamagutityo, Sumiyosi ku, Osaka; Okamoto, 29 Yushima, 6 chome Hongaoku, Tokio.

Nova Germana E.-Movado (NDEB).

Sub la gvidado de s-ro Wohlfahrt en Nachterstedt kaj je kunlaboro de s-ro Wichert-Berlin, eksigita el DEB, kelkaj homoj deziras fondi novan E.-movadon, ĉar al ili ne plaĉas la sintenado de DEB. Kiel kaŭzojn ili nomas 1, ke GEA ne plu taŭgas, 2. ke ĝi ne deziras kunlabori kun hebreoj esperantistaj. Al tio skribas GE: „Dro Zamenhof estis judo, sed li ne estis de tiu speco, kiel la multnombraj, kiuj en la lastaj jaroj je malutilo al nia patrolando venis ĉi tien. Zamenhof estis malegoista filantropo en la vera senco de l' vorto. Ĉu estas justa, eligi liajn samreligianojn de la utiligo de lia kreaĵo en la vicoj de GEA, se ili estas korektaj homoj kaj se neniu deviga kaŭzo tion postulas? Tia estus la ordono, ke la paragrafo pri la arianoj estu aplikota ankaŭ al la membroj de GEA. Nun ekzistas ordonoj, ke tio ne devas esti en ne-politikaj organizoj, kia estas GEA. Kial ni estu „pli papa ol la papo mem", despli ĉar ni uzas kaj disvastigas la kreaĵon de hebreo?"

Ni deziras, ke NDEB ne sukcesos, jam despli ĉar ĝi certe malutilos GEA, kiu jam tiom laboris por nia komuna afero.

Ni sendas al GEA la esprimon de nia plena simpatio. AEA.

Post 30 jaroj.

En februaro 1904 aperis la unua numero de „Esperantistische Mitteilungen" kiel informilo de la en 1903 fondita „Berliner E.-Gruppe". Jean Borel fondis la gazeton, kiu ŝanĝis jam la sekvintan jaron sian nomon en „Germana Esperantisto". La germanaj esperantistoj havas la rajton esti fieraj pro tio, ke ilia organo „Germana Esperantisto" malgraŭ milito kaj inflacio povis aperi senĉesinterrompe.

Unuavice tio estas la merito de Friedrich Ellersiek.

Kresku la Esperanto-movado en Germanujo kaj kun ĝi la jubilanto „Germana Esperantisto". Tion elkore deziras

IEMW, AEA, AE.

Sentenco. de A. Taussig.

Se Dia pens'
Kaj homa mens',
Kuniĝas harmonie,
La geniec',
En eternec',
Triumfas senenvie!

Ne vanta fraz',
Sen senc' kaj baz',
Penetras homan rondon,
La saĝa vort'
Kuu pia fort',
Konvinkas tutan mondon!

Sensacio en Esperantujo.

Sensacio — la monata Heroldo. kiu de post februaro aperos ĉiumonate kun 8—10 paĝoj ilustrita kaj en taĝjurnala formato. La ĉiusemajna Heroldo tamen aperos La „monata" kostos nur 2 sv. fr. 50 por la jaro 1934.

Abonu ĝin tuj! Sed postulu specialan monatan eldonon!

Skribu al „Heroldo de Esperanto", Brüsseler Str. 94, Köln.

Ellersiek serĉas helpantojn!

En majo pasintjara li elvenigis la specimenan numeron de sia Esperanto-Roman-Gazeto. Amikoj. kun kiuj li antaŭe priparolis sian ideon, trovis ĝin bonega kaj antaŭdiris al li certan sukceson. Sekve — li transiris Rubikon-on.

Sed la sukceso ne venis. Al la 5000 dissenditaj ekzempleroj de la specimena numero ve is amaso da laŭdo kaj aproboj, tre malmultaj malkonsentoj, sed ne venis sufiĉa nombro da abonoj! Li tamen estus eldoninta ERG post la 1. de julio, se lia eldonejo, same kiel aliaj similaj entreprenoj en Germanujo, pro konata kaŭzo ne estis trafita de ekonomia krizo, kiu — Ellersiek tion malkaŝe diras — ne lasis al ĝi la sufiĉajn monrimedojn. por efektivi gi la daŭrigon kun malgranda, nur malrapide kreskanta abonintaro.

Nun mia amiko Ellersiek faras jenan proponon, kiun mi persone rekomendas al ĉiuj interesitaj s-anoj: „Kiu el vi es as preta, disponigi al mi 20 Rm., por per tio fariĝi abonanto de E-R-G por kvin jaroj? La ordinara jara abonprezo estas 6 Rm, do antaŭpagante vi ŝparus per la kvinjar-abono trionon. Jam iom pli ol 150 tiaj abonantoj sufiĉus por garantii la regulan eliron de la gazeto dum la unua jaro, kaj se hezitemuloj vidos, ke ĝi seninterrompe elvenas, ili aliĝos kiel ma plilongtempaj abonantoj kaj alportos pliajn vivrimedojn por la sekvontaj jaroj. La kalkulo ne estas fantazio, sed baziĝas sur spertitaj faktoj.

Eĉ por la okazo ke post paso de unu jaro aŭ jam pli frue mi denove staros antaŭ la neceseco, ĉesigi la eliradon de la gazeto, via mono ne estos perdita, ĉar tiukaze vi havos la rajton, elekti por ta restanta sumo librojn el mia eldonejo. Fidu al mi, mi ne trompos vin!"

Sendu vian kontingenton da 20 Rm ĝis 15. de marto al Esperanto-Verlag, Wilmsstrasse 5, Berlin SW 61.

Esperantaj vortludoj.

Ĉu vi scias, ke

1. la mondo estas er-aro.
2. la horo loĝas en la hor-loĝ-ejo.
3. kelkaj katoj, kunvenante, fariĝas kataro.
4. se via kolo estus pli dika, pli granda, tio estus kolego; ero de ĝi estus kolero.
5. komo negranda povas esti kometo.
6. negranda ripo estas ripeto, kaj ĉiuj ripoj kune estas riparo.
7. la katoj estas frandemaj pri la kolo de la musoj; do ili tre ŝatas la muskolon.
8. du komoj kune povas esti komparo.
9. kiam aktoro havas rolon, kia konsistas nur por peti, li havas petrolon.
10. iuj homoj ŝatas gazon, sed aliaj preferas gazeton.

Jubileo.

Germana Esperanto-Librejo en Leipzig C 1, Hospitalerstr. 2 ekzistis la 2. I. dudekkvin jarojn. Post fondo de Saksa E.-Instituto la librejo estis fondata de s-ano Bernhard Kötz. La firmo sukcesis pro sia rapida kaj akurata servado kaj akiris famon en Esperantujo. Koran gratulon!

La misvojo.

Himno de la pesimistoj.

Dediĉita al la homoj, kiuj ĉiam plendas, sed nenion faras.

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Ak kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron.
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj pasintaj pensante;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.
„Laboru kaj fidu!" La homoj nin petas,
„Neniam!" en horo ni krie ripetas,
Obstine gruntante — neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj ne mankos.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkintajn folijn disĵetas,
Ni helpos la venton, kaj, refortigitaj,
Ni plenan disfalon profetas.
Eĉ kiam la krizo jam estas pasinta,
Kaj fido en koron denove veninta,
Obstine ni tedas per malpropagando
La homojn tra tuta la lando.

(De Ferdinando Redondo,
el Hispana E.-Gazeto).

Niaj karaj mortintoj.

Grosjean-Maupin.

Ni ĉiuj scias, kiel malprofitiga estas la pionireco pri la novaj miskonitaj progresoj kaj ni ŝuldas specialan dankon al la homoj, kiel Grosjean-Maupin, kiuj senlace dum multegaj jaroj oferdonis sian agemecon, inteligentecon kaj ĉiuspecajn penadojn por diskonigi kaj akceli progreson de nia kara lingvo.

Nia amiko dediĉis al ĝi senhalte grandan parton de sia vivo.

Naskita en Nancy en februaro 1863 li esperantiĝis en 1906. Li verkis multe ajn recensojn kaj prilingvajn artikolojn en diversaj E.-gazetoj kaj estis redaktoro de „Franca Esperantisto“ dum ĝia tuta ekzistado (1908-21), Lingvakomitatano (1909), Akademiano (1926), direktoro de la Sekcio por komuna vortaro ktp.

Jen listo, verŝajne ne kompleta, de liaj verkoj:

1. Versions et Thèmes,
2. Corrigé de Thèmes (tous deux en collaboration avec Aymonier),
3. Cours élémentaire pratique, d' après la méthode directe combinée,
4. Praktisches Lehrbuch und dessen Schlüssel, kun Sprotte,
5. Dictionnaire complet esperanto-francais,
6. Dictionnaire usuel esperanto-francais,
7. Dictionnaire complet francais-E.
8. Dictionnaire usuel franc.-E.

   Aperis pluraj eldonoj, ĉe Esp. Centra Librejo.

9. Plena Vortaro, aperinta 1930, gravega verko, kies ĉefa aŭtoro li estis.

Kvankam zorge atentinte la bezonojn de la poezio kaj de la belliteraturo, li tamen senĉese admonadis, ke oni nenion troigu, ke la esenca kaj plej necesa eco de lingvo internacia estas la facileco, kaj ke plidikigo de la vortaro estas ofte ne pliriĉigo, sed nur balastigo. Nelonge antaŭ sia morto prez. Cart en la epilogo de sia libro „Vortoj de prof. Cart“ skribis: „En tiu ĉi kvazaŭ testamento mi deziras enskribi la nomon de mia kolego, Prof. Grosjean-Maupin, kiu de la komenco de mia prezidanteco, pli ol iu ajn alia, faciligis mian akademion agadon“.

Apud la nomo de la geniega Zamenhof, tiu de Grosjean-Maupin, la plej utila, la plej laborema el ĉiuj vulgarigintoj de Esperanto, meritas resti enskribita en niaj koroj.

Ernest Archdeacon (Franca E.-isto.

D-ro Henri Sentis.

La 15. dec. 1933 mortis en Grenoble d-ro Henri Sentis, unu el la plej malnovaj francaj esp.-istoj. E-isto depost 1900, li kreis 1902 kune kun Boirac, Evrot, Aymonier la Grenoble-an grupon, kies sekr., prez. kaj honora prez. li fariĝis. Li naskiĝis 1850 en Briancon, studadis en Paris, instruis fizikon kaj estis prof. en la liceo de Grenoble de 1881-1913. Dume li doktoriĝis. Li skribis diversajn lingvistikajn verkojn, inter kiuj „Kion bezonas E.?“; en ili li konigis siajn personajn ideojn pri la perfektigo de E. Li ankaŭ skribis literaturaĵojn „Urso“, „En monto“, Blua kardo“ kun reformemaj tendencoj. Je ĝia apero Ido ŝajnis al li la vera solvo de internacia lingvo, sed post kelmonata ellernado, li honeste konfesis sian eraron. Ĝis sia morto li eldonadis regule lingvistikajn foliojn, plenaj je interesaj rimarkoj.

Li ĉiam konscience kaj sincere laboris, celante nur la bonon de E., neniam sian profiton aŭ gloron.

A. Ploussu (Franca E.-isto.)

Int. E-Muzeo ricevis de la kara aron de liaj verkoj kaj danke memoras tiun nian pioniron. IEMW.

Henri Rollin.

Inter la viktimoj de la katastrofo fervoja de Lagny estis ankaŭ Henri Rollin, deputito de la departemento Haute-Marne kaj urbestro de Saint-Dizier. 1932 li konatiĝis kun E. kaj multe interesiĝis pri ĝi. Li estis unu el la unuaj membroj de la „Grupo por la Defendo de Esperanto en la Ĉambro de Deputitoj“.

Al la familioj de la karaj samideanoj nian emocian kondolencon! IEMW, AEA.

Aŭstria Esperanto-Asocio

Wien I. Neue Burg, Heldenplatz

Koran gratulon al

Dro Rudolf Manda, kiu fariĝis „Wirklicher Hofrat“,

kaj al

Dro Leopold Buchsbaum, kiu fariĝis „Oberpolizeirat“.

Austria Esperanto-Asocio: Steiner

Radio Wien.

Es sollen — angeblich wegen Beschwerden gegen Esperanto — die Vorträge ab nun nur alle 14 Tage stattfinden. Wir wollen nun der Ravag zeigen, dass genügend Interesse für Esperanto herrscht, daher soll jeder einzelne Leser der Zeitung auf einen Bogen die Bekannten und ihre Familienmitglieder mit genauen Namen und Adresse unterschreiben lassen und bis Anfang März sicher an AEA senden. — Jeder von Euch bemühe sich sogleich, der eine wird 20, der andere 100 oder 200 Unterschriften zusammenbringen, in Summa ergibt das tausende. Beigelegten Streifen wollen Sie als Ueberschrift auf den Unterschriftenbogen aufkleben! Dann unterschreiben lassen!

Internacia Konferenco. Aŭstrianoj pagas ŝ 3 por la konferenckarto kaj rajtas ricevi je distancoj de pli ol 30 km 25 % rabaton sur la fervojo kaj ĉeesti la Malfermon en la Parlamentejo, la laborkunsidojn en Landhaus ekskurson al Kobenzl kaj Grinzing. Krome ili povas partopreni en ĉiuj aranĝoj kontraŭ pago de la koncerna enirprezo rabatita. Ili ankaŭ povas ricevi rabatitan bileton je 20 % al la prezentado de Fledermaus en Staatsoper, sed nur laŭ la numero de la aliĝo. Ekzemple povas okazi, ke venos multaj alilandanoj, (kiuj jam senpage ricevos la bileton, paginte S 20.— Konferenckotizon), kaj tiam nur malmultaj povos eble ricevi biletojn al Fledermaus. En tiu kazo eventuale al la aŭstrianoj nroj 1—50 ricevos biletojn kaj 51 aŭ 256 ne plu. Tial rapidu aliĝi, ĉar jam aro aliĝis.

Vi legis en nro 1 pri la instancoj invitotaj! Ni deziras, ke en la Konferenco partoprenu ĉiuj instancoj, kiuj devas havi intereson je fremdulfrekvento, komercaj interŝtataj rilatoj, lernejoj ktp. . . . Vi, grupoj kaj ankaŭ unuopaj samideanoj, klopodu, interesigi kiel eble plej multajn tiajn korporaciojn, por ke ili partoprenu en la konferenco aŭ per propra delegito aŭ per esperantisto. La partoprenontoj kompreneble pagos la plenan kotizon de ŝ 20.— (svis. fr. 12.—) ankaŭ, se esperantisto ilin reprezentos. Ni pensas pri fremdulfrekventoficejoj de viaj urboj, komercaj ĉambroj, grandaj eksportfirmoj, komercaj lernejoj ktp.

Krome bonvolu informi nin, kiujn gravajn personojn ni invitu al la konferenco per honorkartoj (direktoro de fervojdirekcio, poŝtdirekcio, landestro, ktp). Urbestroj reprezentu la urbon kaj pagu la kotizon.

Anoncu vin tuj kaj sendu S 3·—

Prüfungen für das Lehramt und den Nachweis der Kenntnis des Esperanto.

Beginn am 4. April um 8 Uhr früh mit der schriftlichen Prüfung in der Bundeslehrerinnen-Anstalt in Wien, I, Hegelg. 14. Die Zeit der praktischen und mündlichen Prüfungen wird den Prüfungswerbern einzeln bekanntgegeben. Mit 1 S gestempelte Gesuche um Zulassung zu den Prüfungen sind bis längstens 21. März l. J. bei der Direktion der Prüfungskommission in Wien, I, Burgring 9 (Stadtschulrat), Zimmer 53, einzubringen. Weitere Einzelheiten geben wir gegen Rückporto.

Esperanto-Klub

Lichtbilderabend am 6. März

im Klubheim »Goldener Saal« des Kaffee Siller, Wien, I. Schwedenplatz.
Es spricht Redakteur H. Günther
über die
»Wunderwelt Hohe Tatra«.

Beginn genau 20 Uhr
Eintritt frei! Gäste willkommen!

„Das Kleine Volksblatt" feierte seinen 5-jährigen Bestand. Wir gratulieren herzlichst diesem Blatte, das sich mit einer eigenen Rubrik in den Dienst des Esperanto gestellt hat. Steiner.

Innsbruck. Laŭ klopodoj de s-ano Kühbacher komenciĝis E.-kurso, por kiu Komerca Akademio disponigis ejon . . . La polica ĉefo instigis siajn subulojn al E.-kurso, kiun ankaŭ deziris partopreni aro da policistoj. Sed pro la politikaj cirkonstancoj ili nuntempe ne povas partopreni pro sia deĵoro.

Krems. La 11. jan. okazis ĉefkunveno, en kiu la ĝisnuna estraro estis reelektata. Nia fervora s-ano Stanke denove estas prezidanto.

Danubio-Wien 4 aranĝoj en januaro kun bela programo, kiun kunhelpis ges. Cech, Mudrak, Vasta, Sprinzl, Böhm, Dro. Pfeffer, Welward, kort. kons. d-ro Heeber, d-ro A. Mildwurf, A. Klein, Trs, ktp.

Fideleco-Wien havis la 6. febr. sian ĝeneralkunsidon. La estraro estis reelektata, nur anstataŭ la vicprez. Klausberger, kiu rezignis pro sia aĝo, Amtsrat Carl Gasperini fariĝis vicprez.

Einzelesperantisten. Schliesst Euch der Organisation an. Ihr zahlt, ohne Mitglied einer Gruppe zu sein, monatlich 50 gr einschl. Bezug unserer Zeitung.

Jeder soll organisiert sein! Die Beträge können auch im Vorhinein für mehrere Monate bezahlt werden auf das Konto D 3.733 Erwin Gerhard Bernfeld. AEA.

Sinceran kondolencon ni diras al nia **s-ano d-ro Emil Pfeffer** kun edzino, al la patrino kaj fratinoj, pro la grando perdo, kiu trafis ilin per la elmondiĝo de l' patro de d-ro Pfeffer. Li estis bonega edzo kaj patro kaj afabla, modesta kaj tre klera homo. Li ripozu en paco!

AEA: Steiner.

Rimarkindaj presaĵoj

Literatura Mondo, Budapest.

„Eterna Bukado", poemoj el 22 lingvoj, de L. Kalocsay.

La famkonata hungaro dediĉas sian antologion al la memoro de Antoni Grabowski kaj li rajtas tion fari. En majstra formo li tradukas poemojn ne nur de diversa nacieco, sed ankaŭ el ĉiuj epokoj. La aranĝo estas proksimume kronologia. Precipe la esperantistaro dankos al la kolektanto pro la perigo de valoraĵoj el la poezia trezorejo de lia patrolando, de la balkanaj ŝtatoj, de Nederlando, Estonio kaj de la ekstrem-orientaj landoj. Laŭforme eble plej plaĉos la senrimaj, sed pro tio ne malpli „laŭleĝaj" ritmoj (heksametro, antikva liriko, orientalaj metroj). Kiel perlojn inter la tradukaĵoj mi menciu interalie parton de la „Kanto de l' Kantoj", himnon al Diana de Sappho, la vintran odon (I, 9) de Horaz, „Sub la tilio"

de Walter von der Vogelweide, la kvinan, kanton el la „Infero“ de Dante, kelkajn sonetojn de Shakespeare, la du poemojn de Schiller; de Goethe „Vesperkanto de l' migranto kaj Prometheus“; du poemojn de Lenau; „Ripozos vi por ĉiam“ de Leopardi; multajn versojn de Petöfi; du famajn poemojn de Verlaine; verketon de Tagore (La ĝardenisto kaj la reĝino“). En la notoj pri la poetoj oni korektu la indikon pri la elparolado de Caancer (o, ne aŭ!) kaj la jaron de la morto de Heine (1856 ne 1865)

Kalocsay uzas plejgrandamase verbojn desubstantivajn (blanki ktp eĉ honorati, amareci) kaj memstarajn radikojn por la malo de iu kvalito (trista, povra). Neoficialajn vortojn k. mitologiajn homojn li klarigas k. aldonas fontindikon rilate la novajn vortojn. En la aplikado de sufiksoj li estas iom ŝparema. Krome mi notis kiel dubindajn formojn pĝ. 14 turnas min la kap' (es schwindelt mir der Kopf) pĝ, 32 kiom (sen „da“ pro la metro uzita) p. 45 kaj ofte „trezoro“ en la senco de „amatino“, p. 63 kiam min ekvidas (sen subjekto „li“) p. 71 jeni, p. 75 post ol (-kiam), p 85 malhardi (anst. igi), p. 129 Knabo rozon ŝiris do (senco: tamen), p. 131 ne „dankon“, sed „danku“, p. 143 reblui (-iĝi), p. 186 ĝis (solange, eble „dum“), p. 212 primavera (anst. printempa), p. 215 la sekretoj memaj (de vi mem) p. 298 diablon aparteni (al diablo), p. 279 korni estas eble preseraro por „kroni“. Kelkfoje la tradukisto antaŭirigas tabelvorton interrogativan per „ke“. Iom tro libera ŝajnas la ritmo de „Al Lesbia“. Kiel rimon Heinecan en la Camoes-traduko mi citu „do vi — movi.“

D-ro Biehler.

Eld. Soc. Esperanto-Stockholm. „Huru leder man fortsättninskurser i Esperanto ?“ (Kiel oni gvidas daŭrigajn kursojn en Esp.?) de Einar Dahl. Gvidilo por studgvidantoj. 40 pĝ, 12. 18.5 cm. prezo sved. Kr. 1; 1933.

Sveda E.-Federacio komencis eldonigi serion da praktikaj helplibroj por la organiza laboro. La 1. de Einar Dahl pritraktas la organizon kaj gvidon de daŭrigaj kursoj, kiuj estas necesaj, por ke la lernantoj pli multe enpenetru en la scion de la lingvo. Ĉar la organizo varias laŭ la lando, ĝi estas skribita en sveda lingvo.

„La infanoj de Betlehem“ de Selma Lagerlöf. Trad. Oskar Frode. 1933. Sved. Kr. o. 75; 32 pĝ.

Unu el la plej alte taksataj verkoj de la sveda verkistino estas Kristlegendoj, el kiuj unu el la plej belaj estas ĉi tie aperigita. La infanoj de Betlehem estas delikata, kortuŝa rakonto pri la venko de bono super malbono.

„La Esperanto-Klubo“ de Ernfried Malmgren. 2 libro en la serie de praktikaj helplibroj, eldonita de Sveda E.-Federacio. 48 pĝ., 1933, sved. Kr. 1.

La E.-movado en Svedlando rapide evoluiĝis dum 1933. Une el la gvidantoj de, la sveda movado estas Ernfried Malmgren, sekr. de SEF, kiu per la libro „La E.-Klubo“ celis plifortigi kaj pliaktivigi la lokajn E.-grupojn.

La libro, uzebla por ĉiuj landoj, donas konsilojn pri fondo de E.-klubo kaj prezentas utilajn proponojn per la kluba vivo. La libro estas valora, montrante kiamaniere oni aranĝu la laboron en amuza kaj rezultiga maniero. Malmgren donis aron da bonaj ideoj por la esperantistaro.

Esperanto-Katalogo. Prop. 1. 1933 an 2000 ekzempl., 16 pĝ.

Alois Schneider — Magda Carlsson: Barbro kaj Eriko. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 paĝ. 13,5 × 20 cm. Prezo: sved. kr. 0:60.

„Barbro kaj Eriko“ prezentas legolibreton de nova tipo. Du junaj esperantistoj, aŭstria junulo kaj sveda junulino, korespondis kaj trovis unu ĉe la alia grandan simpation. Ili skribas pri siaj landoj, popoloj, familiaj aferoj, kaj fine . . . Sed ni ne devas malkovri sekreton.

Kun granda intereresо oni legas la leterojn de la du gejunuloj. Por kursanoj kaj aliaj studantoj la libro havas grandan valoron ankaŭ pro tio, ke ĝi montras kiel oni korespondas kun samidean(in)o en fremda lando.

La libro estas illustrita per bildoj el Aŭstrio kaj Svedujo, kaj la kovrilo, speciale desegnita de bone konata artisto, vere altiras la atenton.

E. Dahl: „Dialogoj kaj komedietoj“. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 32 paĝ. 12×18,5 cm Prezo: sved. kr. 0:50.

Antaŭ unu jaro aperigis la eldonejo kajeron de la sama aŭtoro kun la titolo: Dialogoj en Esperanto. La libreto tiel bone plaĉis al la legantaro, ke ĝi baldaŭ estos elĉerpita. Anstataŭ presigi novan eldonon, la aŭtoro verkis novan aron da skeĉoj, por ke la grupoj havu pli riĉan elekton.

La celo de la simplaj teatraĵetoj estas, unue: paroligi la grupanojn, due: amuzigi la vizitantojn de grupaj kunvenoj. La skeĉoj postulas malmulte da aranĝoj, la lingvaĵo estas tre facila kiel ankaŭ la enhavo. Kiel moto de la libro oni povus meti: Studo per ludo. Tio ne malhelpas, ke ankaŭ malnovaj esperantistoj kun ĝuo legos la libreton

---

Deziras korespondi: José Hernando Garcia-Lozada, Bogota, Apartado 1608, Kolombia Ameriko.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.